# ESPERANTO TRIUMFONTA

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. LeonoZamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Norta, komercisto, Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto, Bucureŝti
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrik-direktoro, Kaunas.

N-o 166
18. 11. 1923

Redakcio:
Ĉefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:
(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon
vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, Bucureŝti, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa


# Denove komerca korporacio por Esperanto.

## Atentindaj dekretoj pri Esperanto de ĉeĥoslovaka registaro.

La vic-ĉefdelegito de UEA por sud-orienta Francujo, konata batalanto por nia afero, s-o L. Poncet en Lyon, informas nin pri la sekvanta deziresprimo voĉdonita de la Lyon'a Sekcio de la Respublika Komitato de Komerco, Industrio kaj Kampokulturo (kunsido de la Direkta Konsilantaro je la 31. oktobro 1923).

„La Direkta Konsilantaro, ekkoninte la decidigajn eksperimentojn de la Komerca Ĉambro de Paris kaj aŭdinte iun el la Sekcianoj, delegitan de sia korporacia sindikato al la Konferenco de Venezia,

manifestas sian simpation al ĉiuj, kiuj per sia penado klopodas havigi al la komerca mondo komunan helpan lingvon,

decidas enskribiĝi kiel komerca Entrepreno al UEA, kaj

rekomendas al siaj membroj, importistoj kaj eksportistoj, lernigi al iu el siaj oficistoj la lingvon Esperanto, kiu, per sia klareco, per sia mirige facila interkompreno kaj per sia ege rapida lerneblo, nepre konformiĝas al la tempoŝparo, fundamento de l'progreso en la mondo de la interŝanĝoj.“

Tiun ĉi atentindan sukceson ni ŝuldas al la iniciato de s-o Leroulier, membro de la Grupo Esperantista de Lyon kaj dumviva membro de UEA, helpita de la prezidanto s-o Digonnet, membro de la Komerca Ĉambro de Lyon kaj la sekretario s-o Mage, membro de UEA.

La Esperantistaro gratulos niajn francajn samideanojn pro tiu ĉi nova sukceso.

## Ĉeĥoslovaka Instrua Ministerio kaj Esperanto.

Ni publikigas ĉi-sube informon de la Ĉeĥoslovaka Esperanto Instituto en Praha, kiun ni rekomendas al la speciala atento de ĉiuj ĉeĥoslovakaj samideanoj. Estos apenaŭ necese, atentigi pri tio, ke laŭcela utiligo de tiuj-ĉi favorigoj al Esperanto povos grave antaŭenpuŝi nian movadon. La spertoj de simila germana instituto pruvas la aserton, ke sole laŭsistema kaj bonkvalita laboro ĉiurilata ebligos la valorigon de tia oficiala helpo. Ni do tre rekomendas al ĉiuj interesatoj interrilati pro la entreprenotaj paŝoj kun la Ĉeĥoslovaka Esperanto Instituto en Praha. (Adr. Křemencová 17, Praha II.)

* * *

La Ĉs. Instrua Ministerio aperigis ĝis nun la jenajn dekretojn, kiuj rilatas al la enkonduko de Esperanto en la ŝtatajn lernejojn:

I. Lektorado de Esperanto en la alta lernejo por specialaj sciencoj ĉe la teknika lernejo en Praha, fondita la 13. XI. 1922. N-o 115445 instr. min. (Lektoro A. Pitlík.)

II. Enkondukon de Esperanto en duagradajn lernejojn rilatas dekreto de la 27. III. 1920 n-o 5545/21 i. m., publikigita sub n-o I. B. 718—31171 de la 14. IV. 1921 (Landa lerneja konsilantaro) sur p. 185 en n-o 20a de la jarkolekto 1921 de la oficiala bulteno „Věstník“ de la instrua ministerio:

„La ministerio estas preta en lernojaro 1921/22 permesi ĉie, kie por instruado de Esperanto estos favoraj kondiĉoj personaj kaj aferorilataj, nedevigan instruadon de ĉi tiu lernobjekto en ŝtataj duagradaj lernejoj. Oni ordonas al la direktoro, ĝis fino de la lernojaro 1920/21, kondiĉe, ke anoncos sin sufiĉa nombro da partoprenontoj por la venonta lernojaro, proponi la enkondukon de ĉi tiu lernobjekto en la instruplanon kaj sciigi, kiamaniere la proponita instruisto akiris la tiurilatan kapablecon.“

III. „Věstník“ de Ĉs. Instrua Ministerio (jarkol. III. n-o 74, la 15. V. 1921) konatigis provizoran normalan instruplanon por komercaj akademioj, kie Esperanto estas menciita inter la nedevigaj lernobjektoj. La tiurilata punkto (23) estas jena:

„2 lecionoj semajne en komuna kurso. Esperanton oni instruas en kurso, en kiu estos akceptataj sole lernantoj, kiuj almenaŭ dum 3 jaroj lernis iun romanan lingvon.“

IV. Ekzamenaj komisaroj de Esperanto estas nomitaj ĉe la Ekzamenaj Komisionoj por popolaj kaj burĝaj lernejoj en:

Praha: Jos. Eiselt, eksgimnaziestro (dekreto de la 30. X. 1920 n-o 67780 i. m.) kaj
D-ro Ad. Bischitzky, kuracisto (30. X. 1920 n-o 68477 i. m.)

Brno: Inĝ. V. Kroužil, profesoro (27. X. 1920 n-o 67190 i. m.) kaj
Ot. Leneška, direktoro de la komerca akademio (31. X. 1920 n-o 58867 i. m).

V. Aprobitaj lernolibroj de Esperanto, por:

a) duagradaj kaj burĝaj lernejoj:
1. Julie Šupichová, faka instruistino (30. X. 1921 n-o 90497 i. m.) kaj
2. Josef Süsser, profesoro (26. VII. 1921 n-o 67262 i. m.), kaj

b) duagradaj lernejoj:
1. D-ro Adolf Bischitzky, kuracisto (28. 11. 1922 n-o 129873 i. m).

VI. Ĉs. Instrua Ministerio per dekreto de la 22. V. 1923 n-o 46455/1/4. VI. 1923 n-o III-A 831 (8—50120 de la landa lerneja konsilantaro kaj 16. X. 1923 n-o 10259-VI de la lernejestraro de Praha) permesis je speciala petskribo por la lernojaro 1923—24 senpagan instruadon de Esperanto en unu kurso (1 leciono semajne) ĉe la burĝa knabina lernejo en Praha VII.

* * *

„U Studánky“. Partopreni estas permesite al la knabinoj, kies rezultato en la ĉeĥa lingvo estas tre bona kaj kiuj ne estas tre okupitaj per lernado de aliaj nedevigaj lernobjektoj.

* * *

En intereso de l' sukceso de la tiurilata petskribo al la Ĉs. Instrua Ministerio konsiliĝu — antaŭ la prezentado — pro la enhavo de la petskribo kaj ĝiaj aldonoj kun la Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto, kiu poste kompleze intervenos pri la afero.

**Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto.**
(Praha II. 1999.)
*A. Pitlík*, Direktoro.

N-o 184/23. 10. 11.

## Zamenhofa Tago
### por la Zamenhofa Monumento.

La homo, al kiu ni ŝuldas nian lingvon kaj ĉion, kion ĝi alportis al ni, D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, mortis antaŭ kvin jaroj, kaj la tombo, en kiu lia korpo ripozas, ankoraŭ restas sen monumento.

La Komitatoj, kiuj prizorgas la starigon de inda monumento sur lia tombo diligente laboris, sed ĝis nun apenaŭ duono de la sumo, bezonata por ĝi, estas enkasigita. Tiu honto ĉe la Esperantistoj ne plu daŭrigu.

La desegno premiita, kiu kontentigas la familianojn de D-ro Zamenhof, konformas entute al la tombejaj kondiĉoj, kaj, krom ĉe kelkaj malmultaj parokoj, plaĉas al la Esperantistoj. La monumento estos konstruita el malhelgriza bonega granito, kiu estas tre nobla kaj longedaŭra.

En multaj grupoj Esperantistaj la 15. decembro estos festata kiel Zamenhof'a tago. Ni alvokas ĉiujn grupojn tra la mondo, en tiu tago fari specialan monkolekton, aŭ vendi kupon-kartojn por la monumento.

Se 5000 Esperantistoj donacos ĉiu po unu ŝilingo dum tiu tago, ni havigos la plenan sumon ankoraŭ bezonatan por nia celo. Ĉu tio estas tro granda postulo? La respondon donu la Esperantistoj mem.

**En la nomo de la Organiza Komitato.**
*J. D. Applebaum*, Honora Sekretario.
11, Mayville Rd., Mossley, Liverpool, Anglujo.

Oni povas sendi monon al la Honora Sekretario aŭ al Honora Kasisto s-o W. M. Page, 31, Queen Street, Edinburgh, Skotlando.

## Socia vivo.
### Socialaj studoj.

De R. Civinski, Petrograd.

### Efektiva kaŭzo de militoj.

II. (Daŭrigo).

Ĉiu regna potenco estas terura malĉasto kaj deveno de ĉiu sociala krimo kaj malbono sur tero; sekve forpelu kaj neniigu ĉie en mondo la regnan potencon. Tiam ĉiu tera malbono, kaj kun ĝi la militoj, tuj malaperos.“ —

Sed jen elpaŝas kun kontraŭdiroj al marksanoj kaj al anarĥiistoj reprezentantoj de alia vidpunkto, kvankam iom nedifinita kaj iom malklara, tamen ankaŭ sufiĉe disvastigita, tio estas reprezentantoj de la doktrino — „pacifismo“. Pacifistoj siavice kontraŭdiras al marksanoj kaj anarĥiistoj. „Vi asertas, — parolas ili al la ambaŭ lastaj, — ke kapitalistoj kaj regna potenco estas kaŭzo de militoj. Sed per kia rimedo kapitalistoj kaj potenco povas fari militojn? Ĉu ne per militistaro? Sekve do la militistaro estas senpera, kaj efektive sole, vera kaŭzo de militoj. Forpelu tute kaj ĉie el mondo la militistaron, rifuzu kaj ne iru mem servi en militistaron, kaj tiam nek kapitalistoj, nek registaro sukcesos aranĝi militojn, ĉar tiam forestos la por tio necesa militistaro, kaj tiel militoj tute nature kaj certe malaperos.“ Tiel predikas ordinare, mildaj, kvietaj reprezentantoj de la pacifisma-kristanisma kredo, similaj al la fama rusa verkisto kaj filozofo Tolstoj kaj aliaj. —

Do, ni trarigardis laŭ ĝeneralaj trajtoj la konceptojn de la problemo pri kaŭzo de militoj en opinioj de reprezentantoj de plej grandaj kaj preskaŭ solaj politike-socialaj doktrinoj, kiuj ĝis nun ekzistis kaj ekzistas en nuntempa intelekto de la homaro.

Kiu do el ĉi tiuj tri konceptoj estas efektive prava kaj tute vere logika?

Mi persone permesas al mi opinii, ke tute neniu el ĉi tiuj tri supremontritaj konceptoj estas efektive prava kaj logika! Mi konstruas tiun ĉi mian opinion je tiu logika bazo, pro tio ke mi povas prezenti tre bonan kaj klaran ekzemplon politike-socialan. Laŭ la vidpunktoj de la tri supremontitaj doktrinoj estas tute evidenta kaj senduba fakto, ke milito povos neniel okazi, kiam ĉiuj tri montritaj kondiĉoj de milita origino ekzistos samtempe kaj samloke.

Tial do ni turnu nin al la logikaj bazoj, sur kiuj mi ĝenerale surkonstruas la pruvojn de malpraveco de ĉiuj supremontritaj opinioj pri la problemo de kaŭzo de milito kaj ankaŭ la pruvojn pri la praveco de tiuj klarigoj kaj opinioj, kiujn mi persone havas pri tiu ĉi grava problemo.

III.

Do, mi petas nun la legantojn pripensi kaj atente trarigardi mian jenan ekzemplon. Oni imagu du najbarajn gubernioin en estinta aŭ en estanta Rusia regno: Kaluga kaj Tula. En ĉiu el tiuj ĉi du gubernioj egale estis kaj estas: 1. kapitalistoj, 2. potenco, en persono aŭ de antaŭa guberniestro, aŭ en persono de nuna soveta gubernia komisaro, kaj 3. militistaro. Sekve de tio tie ekzistos sendube samloke kaj samtempe ĉiuj

3 necesaj kondiĉoj, kiuj, laŭ doktrinoj de marksismo, anarĥiismo kaj kristanpacifismo, kune prenitaj estas necesaj kaj sufiĉaj por tie aperigi militon. Tamen ĉu povas efektive aperi la milito*) inter tiuj ĉi landoj-gubernioj?

Ĉiu, kiu scias aŭ aŭdis iom pri Rusujo kaj pri tiuj ĉi gubernioj, partoj de Ruslanda regno, ĉiam nepre tuj decidite respondos: „Certe, inter Kaluga kaj Tula gubernioj la milito neniel estas ebla."

Efektive, se eĉ ĉiuj kapitalistoj ekzemple de Kaluga gubernio neesprimeble forte kaj pasie ekdezirus deklari la militon al la gubernio de Tula, tamen estas sendube tro malmulte da ŝancoj por atendi, ke la ĉefa potenco de la gubernio de Kaluga en persono de l' guberniestro (aŭ ia nuna sovjeta komisaro) aŭskultos plendajn laŭtvoĉajn alvokojn kaj insistajn postulojn de kapitalistoj, same en Kaluga kiel en Tula gubernioj. Tamen eĉ se troviĝus tia guberniestro (aŭ komisaro) en gubernio Kaluga, kiu efektive laŭ insisto de kapitalistoj, aŭ laŭ sia propra libera iniciato, deklarus la militon al gubernio Tula, tiam sendube la Kaluga militistaro ne obeuŝ al lia ordono militiri kontraŭ la Tula-gubernio. Krom tio oni verŝajne deklarus psike malsana similan potencan personon kaj lokigus ĝin aŭ en malsanulejon, aŭ en malliberejon. Kaj fine plue, se eĉ la militistaro plenumus tian deziron kaj ordonon de kapitalistoj kaj potencoj, tiam la supergubernia, t. e. la ĝenerala regna, potenco de Rusujo certe neniam permesos la okaziĝon de tia fakto.

Do, la legantoj verŝajne sufiĉe klare vidas, ke nek kapitalistoj, nek potenco, nek militistaro povas aranĝi iam „Kalugan-Tulan militon". (Supozite estas, ke ambaŭ gubernioj estos subigitaj al unu komuna regna potenco, kiel ekzemple nun.)

Jen do bona ekzemplo, laŭ kiu oni povas plej klare studi kaj klarigi la demandon pri efektiva kaŭzo de militoj.

Vere, se ni faros paralelan komparon de tiu ĉi mia ekzemplo de la du montritaj gubernioj kun a nuntempa stato de la afero en landoj inter regnaj limoj, tiam ni povas klare ekvidi kaj konkludi, ke efektiva kaŭzo de militoj estas entenata nek en kapitalistoj, nek en regna potenco, nek en militistaro, sed nur kaj sole — en foresto de ia tria pli supera potenco super apartaj regnoj, kiu simile al ĝenerala regna potenco, malhelpanta kaj neniiganta la eblecon de milita apero inter apartaj gubernioj de regno, estus same analogie ĝenerala tutmonda potenco, malhelpanta kaj neniiganta la eblecon de milita apero inter apartaj regnoj de la tuta mondo.

La penso de multaj diversaj homoj ofte eĉ preskaŭ kvazaŭ senkonscie alvenis kaj baziĝis dum lastaj dekjaroj je tiu ĉi ĝusta kaj sole racia decido de la demando de mi supre montrita, kion atestas ekzemple apero de tiaj institucioj, kiel la konferencoj de la Hago, kaj nuna „Ligo de Nacioj". Tamen tiu ĉi ilia penso bedaŭrinde ne estis ĝis tuta fino plene logika kaj decideca al la necesaj komparoj kaj konkludoj de mi tie ĉi faritaj. Efektive, se ni komparos mian supremontritan ekzemplon de la du gubernioj kun organizaĵo de regna potenco, staranta super ili, tiam ni ne ekvidos en la organizaĵoj similaj al nuna „Ligo de Nacioj" saman organizaĵon, kiel estas regna potenco rilate al apartaj teritorioj-gubernioj en regno. En kio do estas entenata la plej grava diferenco inter ili? Nu, kompreneble en tio, ke dum regna potenco posedas en sia dispono krom sia spirita aŭtoritateco ankoraŭ nepran kaj tute necesan aldonon en formo de fizika forto: (t. e. militistaro, policistaro, juĝistaro ktp.), dum la nuna „Ligo de Nacioj" tute ne posedas iun el ĉi tiuj necesaj juraj rimedoj. Por havi sufiĉe grandan spiritan aŭtoritatecon oni devas nepre havi la konfeson kaj konsenton de ĉiuj landoj sur la terglobo senescepte, same kiel regna potenco ordinare posedas laŭ sufiĉe granda mezuro tian konfeson kaj konsenton de ĉiuj landoj, ŝtatoj aŭ gubernioj, troviĝantaj en la regno. Por havi sufiĉe grandan kvanton da fizika forto, oni devas havi konforman militan organizaĵon similan al sama en regna organizaĵo. Unuvorte, mi konkludas: por atingi la malaperon de militoj el la politike-sociala vivo de homaro, oni devas aranĝi tutmondan jurorganizaĵon (interregnan mondan tribunalon) kun spirita forto al la faktoroj de la tutmonda politika konstitucio, kaj kun fizika forto al la faktoroj de la tutmonda militistaro (anstataŭ ĉiuj nun ekzistantaj apartaj naciaj militistaroj). Moderna rusa partio de „pliuloj" eĉ tre ofte kaj ĉie parolas pri la tutmonda organizaĵo. Tamen tre granda kaj esenca diferenco estas inter ĝia kaj mia opinioj per tio, ke dum ĝi deziras komence perfortigi la tutan homaron, aranĝante en ĉiuj landoj de la mondo social-ekonomian organizaĵon laŭ sia propra grupa absoluteca gusto kaj filozofio, mi tamen proponas, ke oni eliru de la bazo de tiu stato, en kiu troviĝas ĉiuj ŝtatoj en nuna momento. Nur tio estas konforma al la relativeca filozofio de eventuala estonta epoko de la homaro.

*) Mi komprenas ĉi tie sub la vorto „milito" koncepton de milito nur en ĝia ordinare-populara senco, t. e. nur kiel milito nacie-regna. Ne malpli interesa kaj grava estas demando pri efektiva kaŭzo de militoj klas-ekonomiaj, t. e. tiel nomataj „socialaj revolucioj," kiun demandon de vidpunkto „saisma" mi eble priparolos en iu sekvonta n-o de „ET".

## Kiel oni helpas al la elmigranto hejmsendi siajn ŝparaĵojn.

Multaj elmigrantoj intencas reveni al sia patrolando, tuj kiam ili estos gajnintaj kaj ŝparintaj iomete da mono. Iafoje ili trovas, ke estas malfacile konservi senriske la ŝparitan monon. La malnova metodo meti en ŝtrumpojn bankajn biletojn kaj monerojn ne sufiĉas plu.

Tre interesa aranĝo por helpi elmigrantojn transsendi siajn ŝparaĵojn al la patrolando, ĵus fariĝis de Itala Asocio. La Unuiĝo de Italaj Kooperaj Societoj por fari publikajn laborojn eksterlande interkonsentis kun la Banko de la Francaj Kooperaj Societoj por la transsendo al Italujo de ŝparaĵoj de italaj laboristoj laborantaj en Francujo. Jen la kondiĉoj de la interkonsento.

Labordirektantoj de Italaj Kooperaj Societoj funkciantaj en Francujo ricevas:

1. Specialan ĉeklibreton de la Banko de la Francaj Kooperaj Societoj enhavantan duplikatajn ĉekojn aldone al la laŭkurzaj kontraŭfolietoj;
2. Liston de la italaj bankaj institucioj, kiuj estas agentoj de la Banko de la Francaj Kooperaj Societoj por la pago de ĉekoj en Italujo.

Laboranto deziranta fari pagon sin turnas al la labordirektanto kaj donas al li la necesajn detalojn pri la sumo pagota, la nomo de la pagato kaj la loko kie la ĉeko devas esti monerigata. La labordirektanto metas tiujn detalojn en la ĉekon, en la duplikaton, kaj en la kontraŭfolieton. Poste, li subskribas la ĉekon kaj la duplikaton, ricevas de la laboristo la sumon transsendotan, kune kun unu franko por elspezoj, kaj donas la ĉekon al la laboristo, kiu sendas ĝin poŝte al la pagoto. La labordirektanto sendas al la Banko de la Francaj Kooperaj Societoj la duplikaton kaj poŝtan ĉekon por la sumo pagota. La banko sciigas la italan bankon, kiu pagas la monon.

# Kroniko.

Por servi nian legantaron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraj aŭ privataj sciigoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

## Ameriko.

### Usono.

La naŭa jarkunveno de la Esperanto Association of California, Inc., okazis la 13. okt. ĉe la hejmo de s-o Advokato Brewster F. Ames, del. de UEA.

Ĉeestis UEA-delegitoj de Oakland, Alvarado, Redwood City kaj Escondido kaj vizitantoj de San Jose, Stockton kaj Berkeley.

La membroj elektis s-ojn Ames, Vinzent, Stockton, Rivers, Smith, Rosher kaj s-inon Plise kaj f-inon Van Sloun kiel direktoraron por nuna jaro. Ili ankaŭ voĉdonis monsubtenon de 50 fk. al UEA.

Post la laborkunsido kaj komuna manĝado oni ĝuis konatiĝan vesperon, dum kiu oni havis la plezuron konatiĝi kun s-o Carl Clauson de Gefle, Svedujo.

## Eŭropo.

### Britujo.

*British Esperantist.* Delonge oni sentis, ke en siaj malmultaj paĝoj „The British Esperantist" ne povas kontentige esti samtempe gazeto oficiala, literatura kaj propaganda. De januaro 1924 la gazeto fariĝos pli malgranda, kaj estos plejparte informilo pri oficialaj aferoj de la Brita Esperantista Asocio, kies membroj kompreneble ricevos ĝin ĉiumonate kiel antaŭe.

*Literaturo.* Komence de 1924 la BEA entreprenos la literaturan laboron ĝis nun faritan de la Brita Literatura kaj Debata Societo, kune kun la eldono de la gazeto „Literaturo", kiu restos literatura gazeto en la Esperanta lingvo. Ĉi tio diversmaniere faciligos la aranĝojn administrajn kaj koncentros la movadon. Membroj de BEA ricevos la gazeton „Literaturo" sen plua pago; por aliaj la jarabono estas 2 ŝil. afrankite.

*International Language.* La BEA eldonos plie monatan gazeton nomotan „International Language" kies unua numero aperos la 15. jan. 1924. La redaktoro estos s-o Ch. H. Edmonds, kaj la jarabono estos 2½ ŝil. afrankite. Ĉi tiu gazeto estos grandparte en la angla lingvo, kaj celos propagandon kaj instruon de la lingvo. „La Juna Lernanto" enkorpiĝos en tiun gazeton.

La BEA do eldonos tri periodaĵojn: oficialan, literaturan kaj propagandan; kaj tiamaniere oni esperas pli bone kontentigi la diversajn bezonojn.

*Aranĝo de Britaj Kongresoj.* La BEA aranĝis Konstantan Kongresan Komitaton, kiu kolektos kaj laŭ peto liveros informojn utilajn por la aranĝado de estontaj kongresoj britaj. *Ch. H. E.*

### Ĉeĥoslovakio.

Praha. „Rondeto de Esperantistinoj" en Praha aranĝis la 1. okt. 1923 propagandan paroladon „Pri signifo de Esperanto", kiun faris instr. f-ino J. Ŝupiĥova. Ĉeestis ĉ. 100 personoj.

— La 8. okt. estis malfermitaj: kurso por komencantoj (21 p.), gvidas f-ino Kl. Hlaváĉová; kurso por progresintoj (13 p.), gvidas f-ino L. Dandová.

— La 27. okt. oni aranĝis solenan vespereton, kiun honoris multaj eminentaj Esperantistoj el Praha kaj du rusaj samideanoj per sia ĉeesto.

— Membraj kunvenoj okazas ĉiusabate en „Ženský klub český" Praha II, Jáma 5. Ĉiu estas bonvena! *L.D-á.*

— La Esperanta lektorato de la alta lernejo por specialaj sciencoj ĉe la teknika lernejo en Praha malfermis la 17. okt. priesperantajn prelegojn por la studentoj. Lektoro estas s-o Pitlík.

Teplitz-Schönau. Esp. kurso gvidata de s-o Kreibig kun 24 partoprenantoj en la urba legejo.

### Estonio.

Tallinn. En la loka seminario seminariano R. Cher bone propagandas Esp. Dank' al li ĉe la lernanto-unuiĝo seminaria fondiĝis Esp. fako. La seminaria biblioteko havas Esp. librojn ktp. En septembro k. j. seminariano Ed. Kleener faris paroladon pri Esp., post kiu komenciĝis en la seminario kvar Esp. kursoj. La direktoro de la seminario s-o H. Roos tre simpatias al nia movado.

### Germanujo.

Frankfurt a. M. La 1. julio la grupo perdis malnovan estraranan membron s-on R. Kreuz, nun redaktoro de ET. La grupo nomis lin Honora Membro. Nun nova perdo malgrandigis la rondon de malnovaj samideanoj. S-o Rübsamen, direktoro de la Moderna Lingvo-lernejo kaj de l' Polyglott Club forlasis Frankfurton por translokiĝi al Meksiko. Lia lernejo fermiĝis kaj per ĝi la grupo perdis eĉ sian kunvenejon dum multaj jaroj okupitan. Konsiderante la meritojn de s-o Rübsamen la grupo nomis ankaŭ lin Honora Membro. La grupo kunvenas nun sekve de afabla perado per la kunfondinto de la grupo s-o Barthel en oficista kunvenejo de la granda firmao Beer, Sendheimer & Co — Lastatempe okazis pluraj paroladoj en Esperanto bone vizititaj.

En Selb (Bavarujo) okazis propaganda kunveno kun parolado de la urba sekretario s-o Bayreuther pri „Evolucio de la mondhelplingvo" kaj parolado de la ĉefinstruisto s-o Stang pri „La naturo de Esperanto". Sukceso: 68 komencantoj, instruotaj de s-anoj Stang kaj Deuse.

Mainz. La asocio por popularaj prelegoj akceptis Esperanton en sia programo por la estantaj duonjaraj prelegoj. La aro de la prelegoj komencis la 7. okt. kun ĉ. 60 geaŭskultantoj. Preleganto estas s-o instruisto Läufer.

### Saksujo.

Vigla propagando en diversaj urboj. S-o instruisto Krämer el Annaberg faris paroladojn en Annaberg (4), Schlottau, Cranzahl kaj Sehma. Kurso en Annaberg komencis.

### Hispanujo.

Barcelona. La 20. okt. laŭ ordono de l' tiea policestro, kiu interesiĝas pri la instruo de Esperanto al siaj subuloj, komencis gvidi du kursojn ĉiutagajn, por ĝendarmoj kaj detektivoj, la policinspektoro kaj administra korespondanto de E. T. en Barcelona, s-o Luis Santamarina. La kursoj daŭros almenaŭ 8 monatojn kaj estas partoprenataj de 30 lernantoj.

— La societo „Nova Sento" (Enna 156) malfermis novajn kursojn la 8. okt. sub la estrado de s-o Prof. Arturo Domenech Más, kies klasojn vizitas 40 novaj lernantoj.

### Italujo.

Voghera. Nova grupo fondita. Oni elektis estraron konsistantan el: prez. f-ino Emilia Claretto, instruistino, kas. s-o Giuseppe Ge, instruisto, sekr. s-o Giuseppe Quarone, konsilantoj s-o Carlo Carena kaj f-ino Adalgisa Massone.

### Nederlando.

Utrecht. La 2. nov. la „Rondo Utreĥta Esperantista", alkonformiĝante al la lastatempe ĝeneraliĝanta uzado de la urbaj nomoj en iliaj naciaj lingvoj — dum antaŭ la milito oni kutimis skribi ilin en Esperanto, „tradukis" ilin ofte ĝis nerekonebleco — ŝanĝis ortografie sian nomon. La klubo nun nomiĝas „Utrecht-a Esperantista Rondo".

### Svisujo.

Genève. Ĵaŭdon, la 1. nov. okazis en la ejo de la Esp. grupo „Stelo" tre interesa kunveno. La gesamideanoj havis la plezuron aŭdi paroladon de Prof. Kobajaŝi, Direktoro de la Centra Laborinstituto en Tokio, pri „Historio de Esp. movado en Japanujo". Multe impresis la fakto, ke s-o K., kiu vizitas nuntempe tiun ĉi urbon kaj ĝiajn internaciajn organizaĵojn kaj institutojn, sukcesis paroladi Esperantlingve post nur dusemajna lernado de nia lingvo. Nia nova japana samideano revenos baldaŭ en sian landon; li certigis, ke li faros ĉion eblan por helpi al la disvastiĝo kaj pliviglig̑o de nia movado en Oriento. — Grandan intereson vekis ankaŭ dua parolado farita la saman vesperon de anglino s-ino Bloomfield pri „Bahaismo kaj ĝiaj rilatoj al Esperanto".

# Scienco.

## Psikologio.

### Instituto por studo pri psikologio de krimoj.

Tiu instituto estas establota en Moskva. La instituto havos specialan klinikon por studekzameni la krimulojn.

# Internacia trafiko.

### La Tunelo inter Britujo kaj la Kontinento.

La nepovo de vaporŝipoj dum malbonega vetero eniri en la havenojn de Boulogne kaj Calais denove atentigis la demandon, kiel la transkanala veturado estas reformebla.

Sir Edward Bowron, direktoro de la „Channel Tunnel Company, Limited" diris, ke ĉiu ventego spertita en la kanalo estas argumento por la projektita tunelo. Dum la transportaj aranĝoj de la angla marbordo al la kontinento restos de plej mizera speco, pli grandaj vaporŝipoj ne estos profitdonaj, kaj cetere, la havenoj de Boulogne kaj Calais tute ne estas kapablaj enpreni grandajn ŝipojn. Kvankam oni en Francujo mem sopiras je la konstruo de tunelo, la sinsekvantaj politikaj malfeliĉoj nuntempe ne akcelas la projekton.

Ŝipposedantoj asertas, ke, se oni plibonigus la francajn havenojn kaj pli profundigus ilin, la kanalaj vaporŝipoj ne trovus malfacilaĵojn por eniri eĉ dum plej malbona vetero. *Ch. G. St. M.*

### Alttensiaj elektraj fluoj en Francujo.

Oni iom post iom elektrigas la francajn fervojojn. Ĝis nun estas 8000 km pretaj aŭ en konstruado. La tensioj alternas inter 60 000 kaj 150 000 Voltoj. La suda fervojo kaj la fervojo de Orleans inter Paris kaj Eguzon ankaŭ uzos alttensian fluon. *Josefo Major.*

## Aerveturado.

### Transveturo Roma—Tripoli.

La hidro-aeroplano S 53, kiun pretigis la Hidro-Aeroplano Societo Nord-Italia por fari la transveturon Roma—Tripoli, direktata de Sandro Passaleva, forfluginte la 17. oktobro matene de Sesto Calende, alvenis post tri horoj en Spezia, kie ĝi restis pro la malfacilaj atmosferaj kondiĉoj. La 18. 10. frumatene ĝi reforflugis el Spezia, kaj atingis la haltejon de Vigna di Valle sur la Braccianosa Lago. La hidro-aeroplano de tie flugis al Roma, kie, kiel okazas por la oftaj almariĝoj de hidro-aeroplanoj, kiuj malsuprenis

en Tevero, ĝi almariĝis trans Ponte Molle apud la fonto de „L' Acqua Acetosa“, kie la rivero por nemallonga streko estas bonega direktvojo.

Tie la Delegitoj de Aeronaŭtika Komisarejo kontrolis la aerveturilon por certigi sin ke oni provizis ĝin per la aparatoj de aerveturado, kaj senfadena telegrafio, kiel ordonas la transvetura regularo. Dume la radiotelegrafiaj stacioj de Roma, Napoli, Siracusa, Vittoria, estis avertitaj aŭskulti la signalojn kaj komunikojn, kiujn la Marconi aparato posedata de la aerveturilo transsendis ĉiufoje. Ankaŭ la vaporŝipoj, kiuj sin trovos en la radio-ondoj de la transsendanta aparato, devis ricevi la komunikojn.

La nova aparato radiotelegrafa (krom unu radiotelefona) havis efikan radion de 400 kilometroj.

La aerveturilo, kiu superflugis la urbojn Napoli, Messina, Catania, Siracusa kaj la insulon Malta, estis la unua efektiva ligilo inter italaj kolonioj kaj itala ĉefurbo. *V. Russo, Catania.*

### Moskva—Novo-Nikolajevsk.

Aeroplano de Societo „Dobrolet“, fluginta el Moskvo en Siberion, sukcese alteriĝis en urbo Novo-Nikolajevsk La grandegan distancon de 3600 kilometroj la aeroplano transflugis dum 20 flughoroj, sen iuj malhelpajoj. Survoje la aeroplano por agitado por Aero-Ŝiparo haltis en Kazànj, Ekaterinbùrg, Kurgàn kaj Omsk. *G. T.*

### Ŝipveturado.

Ŝip-kompanio „Société de la Mer Noire et de la Mer d'Azow“ organizas novan veturservon inter Rotterdam kaj Odessa.

## Pacifismo.

### Monda Konferenco de Virinoj.

Monda Konferenco de Virinaj Organizacioj okazos en Londono proksiman jaron. La konferenco estas organizata de la internacia konsilantaro de organizoj de virinoj kaj ĝi diskutos pri la forigo de la kaŭzoj de militado, kaj kiel virinoj plej bone povas agi laborante por mond-paco. Por defendi la celon de la Konferenco neniu aludo estos farata al la faktoj de la antaŭnelonga mondmilito aŭ al la politikaj disputoj estiĝintaj de ĝi. *St. M.*

## Foiroj kaj Ekspozicioj.

### Internacia Ekspozicio pri Akvofortoj kaj Turismo.

En Grenoble (Francujo), oni nun preparas, por 1925, la organizon de grava Internacia Ekspozicio pri ĉiuj aplikoj de akvofortoj al elektroproduktado, kaj ankaŭ pri turismo kaj la industrioj al ĝi rilatantaj. Jam estas certigitaj gravaj monsubtenoj, interalie de la ŝtato.

Grenoble okupas unuan rangon inter la ejoj kun kaj en la turismo, ne nur en Francujo sed ankaŭ en Eŭropo. Ĝi certe allogas multnombran fremdan vizitantaron. *A. P.*

### Naĝanta ekspozicio.

La registaro de l' sovetoj organizas naĝantan ekspozicion, kiu vizitos Skandinavion, Germanujon, Belgujon, Nederlandon kaj Francujon. *R. L.*

### Brutbredada konkurso.

En 1924 okazos en Paris brutbredada konkurso.

### Post la foiro de Frankfurt.

La Foiro de Frankfurt en la lasta semajno de septembro finis la vicon de la foiro de 1923. Ĝi staris sub la plej akra influo de la senekzemple malfacila politika kaj ekonomia krizo, pro kiu Eŭropo nun suferas. Tamen ĝi estis plej bone vizitata kaj tio klare pruvas la konfidon de komerco kaj industrio al la foiro de Frankfurt. Nur la standoj de la firmaoj el la okupita regiono devis resti vakaj. Sed ankaŭ la partopreno de la aĉetistoj estis bona. Oni scias, kiel notinde estas, ke spite de ĉiuj malfacilaj cirkonstancoj multnombraj vizitantoj el ĉiuj partoj de la eksterlando estis venintaj.

Koncerne la foiran negocon oni povas diri, ke Germanujo apenaŭ posedas akcepto-povon por lukso-komercaĵoj, nur la eksterlando sin montris kiel aĉetanto precipe por distingaj specialaĵoj. Sur ĉiuj kampoj de la ĉiutaga bezono — pri ŝuoj, vestaĵoj, mastrumaj artikloj, mebloj ktp. — ekzistis granda aĉetemo; kie aĉetopovo estis, oni okazigis vendojn — al la Saar-regiono eĉ tre rimarkindajn. Libroj fariĝis por germano, iame unu el la plej legemaj homoj, preskaŭ neatingebla lukso. Konsiderinda intereso montriĝis por tekniko, elektrotekniko kaj ludiloj. El Germanujo estis la plej aĉetópovaj la okupitaj regionoj, antaŭ ĉio, kiel aludite, la Saar-regiono.

Ke ĉi tiu aŭtuna foiro, kvankam ĝi devis subigi malfacilaĵojn de plej grava speco, okazis laŭplane kaj orde, atestas sendube la kvaliton de la internaciaj foiroj de Frankfurt. Neniu venis kun grandaj esperoj. Sed la foiro funkciis pli bone ol antaŭe atendite. La foira direkcio helpite de ekspoziciantoj kaj vizitantoj, kiuj dum ĉi tiuj malfacilaj tempoj denove al ĝi montris konfidon kaj sindonemon, ekkomencis la laborojn por la venonta printempa foiro (de la 6.—12. aprilo 1924). Informojn oni postulu de Messamt (Esperanto-fako) Frankfurt a. Main (Haus Offenbach).

## Komerco.

### Adresaro de la Reichenberg'a komerca ĉambro-distrikto.

La eldonejo „Gebrüder Stiepel Ges. m. b. H.“ en Reichenberg eldonis per helpo de la oficejo de la komerca kaj metia ĉambro en Reichenberg „A d r e s a r o n d e k o m e r c j u ĝ e j e p r o t o k o l i t a j f i r m a o j k a j d e f i n a n c i n s t i t u t o j d e l a R e i c h e n b e r g ' a k o m e r c a ĉ a m b r o - d i s t r i k t o“, kiu montriĝas kiel valora serĉlibro por ĉiuj intersatoj, kiuj intencas komerce interrilati kun firmaoj de la tiom evoluinta, en industria kaj komerca rilatoj, distrikto de la Reichenberg'a komerca ĉambro — estu por celo de var-venigado aŭ de var-vendado. Ĝi enhavas laŭalfabetan nomaron de la firmaoj, registron de firmaoj laŭ la fabrikloko de la entreprenoj, laŭalfabetan liston de varbranĉoj, kiel ankaŭ de la koncernaj produktistoj kaj komercistoj, ĉeĥan-germanan, anglan-germanan, francan-germanan kaj italan-germanan liston de varbranĉoj, germanan-ĉeĥan kaj ĉeĥan-germanan liston de la loknomoj. La adresaro enhavas proksimume 8000 firmaojn komerciuĝeje protokolitajn de la Reichenberg'a ĉambrodistrikto. La teksa industrio, disvastigita en la tuta ĉambra regiono, entute per 2 600 metiaj kaj pli ol 20 000 domindustriaj produktejoj, estas reprezentata per 750 firmaoj en la adresaro kun siaj diversaj branĉoj, kiel la kotonspinado kaj teksado, la drapindustrio, lana kaj duonlana fakrikado, inkluzive la strek-lanaj, vikun-lanaj kaj tordit-lanaj spinejoj, tapiŝa, kovrila mebloŝtofa fabrikadoj, lina kaj tola industrioj, la maŝteksaĵa kaj trikaĵa produktadoj, rubandaĵa kaj posamenta fabrikadoj, valorobjekta industrio ktp. Gravege estas ankaŭ la industrio de vitraĵoj kun siaj centroj en la regionoj de Aussig-Teplitz, Haida-Steinschönau kaj Gablonz-Tannwald, kiu montras en la adresaro 412 firmaojn. La branĉo „Industrio de ŝtonoj, teroj argilo ktp.“ estas reprezentata per 200 firmaoj kaj la konstrua metio per proksimume 300 firmaoj. Tre disvastigitaj kaj reprezentataj per respektindaj entreprenoj estas la metalprilaborantaj kaj maŝina industrioj per pli ol 500, la industrioj de ligno, pletoj, tornado kaj skulptado per proksimume 300, la tanista kaj leda industrioj per pli ol 50 firmaoj; la vesta kaj modo-industrioj per 260, la paper- kaj paperaĵo-industrioj per 114, la grafika industrio (libropreseja kaj ŝtonpreseja industrioj) per proksimume 100, la industrio de nutraĵoj kaj ĝuaĵoj per pli ol 1000, la kemia industrio per proksimume 250 firmaoj.

La brunkarba produktado, kiu estas tre grava por la ĉambro distrikto, montras 50 entreprenojn. La vara komercado, reprezentata tiel per multnombraj gravaj grandkomercistoj de la diversaj branĉoj, kiel ankaŭ per mezaj kaj pli malgrandaj firmaoj por kontentigi la senperan konsumon, enhavas en ĉi tiu adresaro proksimume 2640 firmaojn. La trafikaj metioj (transporta metio, ekspedistaj entreprenoj ktp.) montras pli ol 150 firmaojn. La nombro de la bankaj kaj kreditaj institutoj, ŝparkasoj ktp. atingas proksimume 650 firmaojn.

Bonvolu peti informojn de la „Handels- und Gewerbekammer“ en Reichenberg, Ĉeĥoslovakio.

## Filatelio.

### Polujo.

Antaŭ nelonge aperis novaj polaj pm.: 3000 mk. (kun bildo de Konarski) bruna dentumita kaj 10 000 mk. surpresitaj sur la malnova 25 mk. pm. (en la agiotipo). — Baldaŭ aperos ankoraŭ multaj aliaj, ĉar la afranko estas tre altigita (eksterlanda simpla letero kostas nun 20 000 pol. mk.). — *L. Lange,* Nieśwież.

### Rusujo.

Al noteto de s-o H. Frank en n-o 158 de ET estas necese aldoni, ke monopoligo de vendado de la poŝmarkoj koncernas ankaŭ la monbiletojn, kun tia diferenco, ke estas permesite sendi nenuligitajn monbiletojn en Sovetlandon, sed el Sovetlando estas sendeblaj nek nuligitaj nek nenuligitaj monbiletoj. Do ankaŭ monbiletkolektantoj ne kulpigu sovetlandajn samideanojn, se ili ne ricevas de ili respondon, ĉar okazas, ke kun monbiletoj estas iufoje ankaŭ konfiskata la letero mem. *Georgo N. Teterin.*

### Unuiĝo de Sovetlandaj Socialistaj Respublikoj (S. S. S. R.).

Aperis nova poŝtmarka serio, kies valoro estas montrita en oraj kopekoj, kalkulataj laŭ taga kurzo de ora rublo. Ĝis hodiaŭ aperis: 1 kopeko (flava; busto de laboristo), 3 kop. (ruĝa; ruĝarmeano), 4 kop. (rozkolora; laboristo), 6 kop. (blua; vilaĝano) kaj 10 kop. (malhelblua; ruĝarmeano). Ĉiuj nedentumitaj. La serio estos plenigita per valoroj: 2 kop., 20 kop., 50 kop. kaj 1 rublo. *Ge. Te.*

**Al hodiaŭa numero estas aldonita: la novambra „Revuo“.**

## Universala Esperantista Pacifista Ligo

### Sekcio Aŭstrujo.

La Universala Pac-Kongreso de la Universala Esperantista Pacifista Ligo daŭros 3 tagojn. Dum la du unuaj tagoj estos laborkunsidoj, la t r i a n tagon antaŭtagmeze okazos kiel ferma kunsido granda porpaca manifestacio. La s a m a n tagon vespere estos la „Interkonatiĝa vespero“ de XVI-a Universala Kongreso de Esperanto. Pro tio ankaŭ m u l t e g e da Esperantistoj p o v o s veni almenaŭ al la g r a n d a m a n i f e s t a c i o.

Ĉar tiu kongreso estos porpaca fak-kongreso, la jena aranĝo estas tre grava: La o f i c i a l a kongres-lingvo estos E s p e r a n t o. Sed se la delegito de iu ajn ne-esperantista pacifista aŭ porkultura organizo aŭ iu ajn paclaborema persono ĝis aŭgusto ankoraŭ ne sufiĉe bone scipovas la lingvon Esperanto, li povas paroli dum la laborkunsidoj ankaŭ en iu el la naciaj ĉeflingvoj, sed liaj vortoj estos ĉiam tuj tradukataj en la oficialan kongres-lingvon. Dum la granda pac-manifestacio la trian tagon de la kongreso okazos la fest-paroladoj (ĉiu oratoro el la plej diversaj landoj parolos nur po 5—8 minutoj) nur en Esperanto kaj pro la porpaca propagando ankaŭ en germana lingvo, t. e. en la nacia lingvo de la k o n g r e s l a n d o (se ekzemple 1925 eble en Milano — tiam en itala lingvo).

La invitoj pro tio estas forsendataj jam nun en la tutan mondon, por ke la invitotaj organizaĵoj kaj personoj havu sufiĉe da tempo por lernado de Esperanto. *Rudolf Michael Frey,* Wien.

## Internacia sporto.

### Tutruslanda vetkurado de motorbicikloj

okazis antaŭ nelonge. En la 1. kategorio venkis la „Indian“, trakurinta la vojon Moskva—Peterburgo—Moskva (ĉ. 1200 km) en 31 horoj 32 min. kaj 54 sek., en la 2. la „Sunbeam“ (33.45.6) kaj en la 3. la „Indian“ (33.57.8).

### Malpeza atletiko.

La vetludoj de Latviaj Sportaj Societoj rezultigis novajn landajn rekordojn, nome: Stafedkurado 1600 m (200 + 200, 400, 800): 1. „Mars“ (3.55,1 min.), 2. Armea Sportklubo (3.57,5 min.), 3. Latvia Sport-Unuiĝo (4.00.1 min.). Ĵetado de globoj: Kibild (L. S. U.) 12,66 m, Wihtol („Mars“) 12,57 m kaj Jordan („Mars“) 11,99.

### Ŝako.

La internaciaj majstro-konkursoj en Trieste (26. VIII.—10. IX.) rezultigis la venkon de svisa ĉampiono 1923 Hans Joher, Zürich, gajninta 9½ ludojn el 11. La duan premion gajnis Canal, Peruo, per 8½, kaj la trian Yates per 7½. La kvara estis D-ro Tarrasch per 7, la kvina Roselli per 6½; la sesa kaj sepa estis D-roj Asztalos kaj Seitz per po 6.

En nacia majstreco-konkurso la unuan premion estis ricevinta D-ro Gartone Daveglia, Trieste, per 9, la duan Sarcon, Roma, per 7, kaj la trian Trafojer, Balzano, per 3. La kvara kaj kvina estis Traubner, Trieste, kaj Helman, Venezia.

### Vivantaj ŝakoj.

Dum la tutruslanda agrikultura ekspozicio en Moskva okazis ludo inter ŝakmajstro Grigorjew kaj Nenaronow. La ludantoj ludis per vivantaj figuroj. La ludo, ĉeestita de multenombra rigardantaro, finiĝis per la venko de Nenaronow. *R. L.*

## Nekrologoj.

### Paul Theodor Kempe,

eksdel. de UEA en Radebeul b. Dresden (Germ.) Esperantisto de 18 jaroj, mortis, kiel ni bedaŭrinde nur nun sciiĝis, la 2. julio 1923 pro paralizo. Bona kaj agrabla homo, li estis fervora pioniro de nia movado. Li majstre posedis la lingvon, estis diplomito kaj kunlaborinto de pluraj organizaĵoj Esperantistaj. Li restos neforgesebla al ĉiuj, kiuj rilatis kun li. Pacon al lia cindro! Ni ankoraŭ nun sendas niajn kondolencojn al lia edzino. *Iv. H. Krestanoff,* Dresden-A.

* * *

En Jambol (Bulgarujo) mortis malnova pioniro de nia movado, priplorita de la tuta loĝantaro

**s-o P. Spasov, prokuroro,**

kunredaktoro de „Unua Paŝo“. Pacon al li! Al niaj bulgaraj samideanoj ni esprimas nian ĉagrenon pro tiu ĉi perdo.

Abonigu nian gazeton!

# Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale enpresataj ĉiaj sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen ne prenas sur sin iun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si la rajton eventuale rifuzi netaŭgajn artikolojn.

### 236. Rilatas al 197.

Malgraŭ argumentoj de s-o Lorentson ŝajnas esti pli uzinda radiko „sovet“ ol „sovjet“. Efektive laŭ fonetiko rusa litero „e“ estas ordinare prononcata kiel „je“, tamen ĝuste en tiu ĉi vorto sono „e“ tre alproksimiĝas al Esperanta „e.“ En Esperanto ankaŭ ĉu vi skribas „la“ aŭ „lja“, tamen ambaŭ estas prononcataj same. Krom tio skribante „sovet“ ni ricevas: 1) pli mallongan radikon, 2) liberiĝas de tre ofte renkontata en Esperanto litero „j“. rekompence al ŝajna neobeo al fonetiko ni ricevas pli ĝustan ortografion. Ĝenerale, se sekvi tro severe fonetikon, ortografio de multaj Esp. vortoj, devenantaj el rusa lingvo, devus esti ŝanĝita.

*Georgo N. Teterin,* Petrogrado.

### 237. Rilatas al 185 kaj 211.

Por korekti mian respondon al s-o Kronenberg mi devas noti, ke ankaŭ rusa lingvo posedas sufikson „ul“, vere ne tre ofte uzatan kaj tial elvokintan mian eraron. Ekzemple: malpuraĵo (ruse: grjazj), malpurulo (ruse: grajznula).

*Georgo N. Teterin,* Petrogrado.

### 238. Rilatas al 210.

Korespondemuloj faras tre bone, anoncante, kiam ili ricevis jam tro da respondoj, sed, en tia cirkonstanco la samideanoj de sama lando devus peti la superfluajn adresojn, precipe se estas senditaj bonaj ilustritaj pk.

*Charles G. Stuart-Menteth,*
31, Upper Bedford Place, London W.C.1.

# Bibliografio.

## Libroj.

**Üleilmlise keele küsimus, E. N. Setälä.** Publikaĵo de Esperanto Asocio de Estonio. n-o 1. 7-paĝa estona traduko de la parolado de Prof. E. N. Setälä dum la kongreso de Helsinki. Prezo ne indikita.

**Setimo Congresso Brasileiro de Esperanto,** Rio de Janeiro. 19—24 Abril 1923. 89 paĝoj en portugala lingvo, broŝ. 15×22 cm. Prezo ne indikita.

Al eŭropanoj povus ŝajni, ke la Esp. movado en la granda sudamerika kontinento, ankaŭ en Brazilio, ne estus tre forta. Tiu ĉi libro eldonita okaze de la 7-a Brazila Kongreso de Esperanto instruas al ni la malon. Ĝi enhavas sur preskaŭ dek paĝoj registron de ĉiuj grupoj, individuaj Esperantistoj, korporacioj kaj entreprenoj Esperantemaj, kiuj aliĝis al la kongreso, priskribas poste la ampleksan kongresarangôn: la solenan malfermon, la paroladon de la jura ministro brazila, la koncerton, la literaturan konkurson, la konatiĝan vesperon, la diservon, ekskurson al la famekonata „sukerkonuso“ de Rio, la diversajn postajn kunsidojn kaj aranĝojn. Sur pli ol 60 paĝoj ni trovas legindajn paroladojn rilatantajn al Esperanto: la malferman paroladon de s-o José Medeiros e Albuquerque, „Esperanto kaj la universala paco“ de generalo D-ro J. M. Moreira Guimarães, „La neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj“ de D-ro Heitor Beltrão, k. a., poeziaĵojn kaj fine paroladon pri la vivo de Zamenhof.

La libro estas gratulinda eldonitaĵo kaj ne sole interesos samideanojn de portugala lingvo, sed ankaŭ aliajn, kapablaj legi ĝin, kiuj serĉas aktualajn argumentojn pri la rilatoj de Esperanto al la diversaj sferoj de l' ĉiutaga vivo.

*R. Kr.*

## Gazetoj.

La Verda Ombro, Taihoku, Jap., sept. 8 paĝoj en granda formato de taggazeto.

La Suda Kruco, Melbourne, sept.

La Policisto, Budapest IX, sept. Kun aldono „Poŝtisto-Fervojisto. Tre leginda fakenhavo, rekomendata al ĉiuj, kiuj intencas propagandi inter la policistaro.

Amerika Esperantisto, Boston 17. Mass., sept.-okt.

Libero, Kioto. Jap., sept. Aŭtografiita bulteno de la Sanko Esp. Grupo en la Nacia Kolegio. Neabonebla. Tre interesa.

Pola Esperantisto, Warszawa, okt.

Kristana Espero, Karkku, Finlando, majo-aŭg.

Holanda Esperantisto, Zutphen, n-o 95, 23. 10. kaj n-o 96. 3. 11.

France-Esperanto, Paris 9-e, okt.-nov. Kun nova aldono Esperanto et Commerce de la franca societo por la disvastigo de franca ekonomio per Esperanto.

Por la Indiĝenoj, Genève, n-o 4, nov.

La Espero, Stockholm, sept.-okt.

Vegetarano, Hamburg-Fuhlsbüttel, okt. Tre bona fakorgano. Bedaŭrinde ni trovis plurajn germanismojn en ĝi, krome nerekomendindan Esperantigon de urbnomoj.

## Alvoko.

La mizera stato, en kiu vivas jam de jaroj la plejmulto de la enloĝantoj de Germanujo, fariĝas pli peza de tago al tago. Precipe la infanoj suferas pro manko de nutraĵoj kaj plej necesaj vestaĵoj. Multaj — tre multaj perdis siajn patrojn aŭ eĉ gepatrojn. Sed ankaŭ tiuj, kiuj ankoraŭ havas gepatrojn, sentas la mizeron, ĉar nenombrebla estas la aro de gepatroj malsaniĝintaj, malfortiĝintaj pro la suferoj kaŭzitaj per la milito kaj la postmilita tempo. La enspezoj nepre ne plu sufiĉas por la necesaj elspezoj por la vivo, kaj la resaniĝo.

La kristnaska festo de jarcentoj estas la festo de la infanoj, kaj nun la gepatroj malesperas, ĉar ili ne scias, kiel prezenti al siaj infanetoj malgrandan gojaĵon je ĉi tiu tago.

Pro tio la Neŭtrala Esperantistaro 1906 Köln intencas aranĝi kristnaskan festenon por la plej malfeliĉaj el la infanaro de Köln. Ne povante fari ĉion el propraj rimedoj ĝi petegas la eksterlandajn gesamideanojn, helpi per alsendo de mono (biletoj negermanaj), nutraĵoj ktp. Ni elektigos per la lernejestroj nur vere indajn kaj bezonantajn infanetojn.

Geesperantistoj, pruvu, ke ekzistas en la mondo ankoraŭ la fratamo homara, kiel ĝin proklamis nia kara majstro. Li donacis al la mondo eterne militanta nian Esperantan lingvon por la beno de l' homaro. Montru, ke ĉi tiu beno povu efektiviĝi. Eĉ la plej malgranda dono helpos. Duoble donas, kiu donas rapide, kaj se vi mem ne havas ion, kion vi povos fordoni. tiam vi certe havas gekonatojn, kiuj volonte helpos vin, sendi radion de homara amsuno en la mallumon mizeron de socia abismo.

Neŭtrala Esperantistaro 1906, Köln, Hohestr. 26.

*Brakel,* Prez. *Junker,* del. de UEA.

(Rekomendita de la Redakcio.)

# Abontarifo.

## Germanujo.

En numero 164 ni informis pri necesa postpago de 12 miliardoj da markoj. La eksterordinara falego de la marko bedaŭrinde neniigis la postpagon ĝis alveno. La ekonomiaj cirkonstancoj devigas nin pro tio denove peti

**postpagon de 100 miliardoj.**

Samtempe kun tiu ĉi numero ni enkasigas tiun ĉi sumon kaj ni petas ne rifuzi ĝian pagon.

Ne postpagitajn abonojn ni devos ĉesigi aŭ rezervi al ni la fikson de pli alta sumo, ĉe malfruigita pago.

Ni esperas, ke baldaŭ stabiligo de nia valuto evitigos en la estonteco tiajn bedaŭrinde necesajn postulojn. Ni ankaŭ supozas, ke niaj abonantoj plene komprenos la situacion.

## Alvoko.

Sinjoroj delegitoj de UEA el ĉiuj landoj estas kore petataj sendi al la „Centra statistikejo kaj informejo blindula en Praha“ plenajn nacilingvajn alfabetojn (vidulskribajn). precipe sub- kaj superliterajn signojn kun Esperanta klarigo. La nomita institucio bezonas ilin ĉe sia laboro pri kreo de Brajl-sistemaj signoj por diversaj malsamaj literoj de ĉiu nacia lingvo. Adreso: „Centra blindula statistikejo kaj informejo en Praha—Smíchov, Komenského tř. 11. II.“ *Prof. Stanislav Stejskal.*

# Negocaj informoj.

Ni atententigas niajn legaotojn je la anonco de s-o Albrecht, Köln. konata filatelisto kaj unuaranga interŝanĝanto de poŝtmarkoj. Li prove ekuzas Esperanton por tiu ĉi celo kaj garantias pri bona plenumo de deziroj. Korespondado en Esperanto. Ni tre rekomendas la rilatojn kun tiu ĉi filatelisto.

**ZAMENHOFA TAGO POR ZAMENHOFA MONUMENTO.**

Se 5000 Esperantistoj donacos ĉiu po unu ŝilingo, aŭ 10 000 po ses pencoj, ni havos la plenan bezonatan sumon por la monumento.

**Ĉu tio estas tro granda postulo??**

Organizu ĉie specialan monkolekton en la Zamenhofa tago. Postulu la kupon-kartojn por vendi kaj sendu la monon al la Honora Kasisto W. M. Page, 31, Queen Street, Edinburgh, Skotlando. :—: :—: :—: :—: :—: :—:

En la nomo de la Org. Kom.

J. D. Applebaum, Hon. Sek.

11, Mayville Road, Mossley Hill, Liverpool, Anglujo.

**INTERŜANĜO DE POŜTMARKOJ.**

Kvanto kontraŭ kvanto
Kvalito kontraŭ kvalito
Filatelista afranko! :—:

Ne sendas unue. Sendu referencojn aŭ deponu ekvivalenton.

**Albrecht, Köln** (Germ.)
Zuckerberg 8.

**Ĵus aperis**

**„La Reĝo Judea“**

Dramo en 4 aktoj kaj 5 bildoj. El rusa lingvo tradukis V. Devjatnin. Esperantan tekston trarigardis magistro de teologio kaj akademiano prof. A. Dombrovski. — Rekomendita de Esp. Lit. Asocio. Dua eldono, 182 paĝ. 13×18 cm. Prezo broŝ. 2.25 sv. fk, bind. 2.75 sv. fk. plus 0.50 sv. fk. sendkostoj. Por revendistoj rabato.

. . . „La Reĝo Judea“ estas verkita de anonima, tamen tre konata, eminenta rusa poeto, sin kaŝanta sub literoj „K. R.“ La verko estis ludita en Rusujo, en la imperiestraj teatroj antaŭmilitaj. — Ĝi estas tradukita en sep lingvoj. — La eldonaĵo, presita en Dresden (Wilh. Limpert) havas elegantan eksteraĵon kaj estas sen preseraroj . . .“

Mendu ĉe la eldoninto

**P. Medem, Kaunas**
**Smeliu g. 12** (Litov.)

Baldaŭ aperos

**Eŭropo ĉe la abismo**
de
**Francesco Nitti**
iama ministrara prezidanto itala

**Esperanto-traduko**
kun speciala antaŭparolo de la eminenta aŭtoro.

★

Petu prospektojn kaj detalojn kaj sendu antaŭmendojn je favorprezo al

**Frankf. Societäts-Druckerei G.m.b.H., Abteilung Buchverlag, Frankfurt a. M.**

Korespondo en Esperanto. - Ilustr. kartoj rifuzotaj.

# Varbu Anoncojn!

# Anoncetoj.

JUNA KOMERCISTO, 24-jara, serĉas oficon en la ferbranĉo en Ruslando, Rumanujo, Bulgarujo, Holando, Polujo, Turkujo aŭ en Svedujo. Parolas germane, ĉeĥe kaj Esperante. Proponojn al s-o Alfons Rötzschke, Trautenau, Kirchenlaube 21, Ĉeĥosl. [2

ADRESŜANĜO. S-o Samuelo Samuel sciigas siajn gekorespondantojn, ke lia adreso jene ŝanĝiĝis: Cluj, Rumanujo, str. Universitati No. 5. Mi serĉas seriozajn gekorespondantojn. [2

SAMIDEANOJ kaj LITERATUR-ELDONISTOJ! Por ke oni vidu la simplecon de Esperanto kaj ĝian helpon, s-o Spas Dobrev, Remanlar, Bulgarujo, aranĝas grandan kristnaskan ekspozicion. Sendu senpage Esperantaĵojn, gazetojn, papermonon ktp. [2

GESAMIDEANOJ! Kiu estas bonvolema, sendi aŭ prunte aŭ donace 15 dol. aŭ egalvaluton al 17 jara malsana samideanino, ke ĝi povu sin kuracigi. Adreso: Margareto Raffay, Str. Principesa Maria n-o 58 bis, Odorhei, jud. Odorhei (Ruman.) [1

INTERŜANĜANTOJ ATENTU! Laŭ ĉiu foto mi fabrikas belege koloritajn Esperanto-glumarkojn, montrantaj vian portreton, nomon kaj adreson. Uzeblaj por fermi leterojn, beligi leterpaperon aŭ por interŝanĝo. La foto estos nedifektite resendata. Prezo: por 12 ekz. 1.20 sv. fk., 36 ekz. 2.50 sv. fk. aŭ egalvaloro. Franz Christoph, Wien V, Getreidemarkt 13. [3

## Korespondo kaj Interŝanĝo.

Fraŭlo Najden R. Vasilev, 20-jara, libristo, Regenska ul. 43, Sofia, Bulgarujo, deziras havi rilatojn kun komercistoj de diversaj libraĵoj. Korespondas kun gesamideanoj, precipe fraŭlinoj el ĉiuj landoj per il. pk. kaj l. [2

Filatelistoj! Por 2 sv. fk. aŭ egalvaloro mi sendas 20 div. kaj originalajn monatestojn de Germanujo, de Palatinata distrikto kaj de nia urbo. Interŝanĝas pm. ankaŭ papermonon. S-o Albert Jung, Kaiserslautern, Kanalstr. 20, Germ. [2

S-o Izidoro Grünberg, Bucureŝti, Rumanujo, str. Serban Voda 13, deziras korespondi kun Esperantistinoj kaj Esperantistoj de la tuta mondo. [2

S-o Paŭlo Grünberg, Bucureŝti, Rumanujo, str. Anton Pan 2, deziras korespondi kun geesperantistoj el ĉiuj landoj per pk. il kaj l. [2

S-o A. Ĉernjahovsky, Glavna 70, Sliven, Bulgarujo, deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. (bfl.) kun ĉiuj landoj. Fuŝosendaĵoj malakceptataj. Tuj respondas. [2

S-o Otto Dietrich, Fürstenau 50, Post Lauenstein i. Sa., Germ., interŝanĝas pm. kaj papermonon kun ĉiuj landoj. [2

S-o Anatoli Zdanko, Studenecka 3, Nieswiez, Polujo, deziras korespondi kun la tuta mondo (precipe Norvegujo, Turkujo, Grekujo, Svedujo kaj Britujo) per il. pk., interŝanĝas pm. kaj papermonon. [2

Pardonu al mi! Mi ne povas respondi al ĉiuj. Mi ricevis tro da korespondaĵoj. R. Duran, Saint-Omer, Francujo. [1

Fraŭlo M. Kuczarow, Studeneka 35, Nieswiez, Polujo, deziras korespondi k. ĉ. l. per il. pk., ankaŭ interŝanĝi per papermarkoj kaj monbiletoj. Nepre kaj tuj respondos. [1

Paŭlo Varŝanyi, Budapest, 6, str. G. Zichy Jenö 42, Hungarujo, 22 jara artpentrista studento deziras korespondi k. ĉ. l. per l. kaj pk. il. bfl. pri iu ajn temo. Vendas siajn originalajn gravuraĵojn kaj desegnaĵojn en egalvaloro de 30 000 hungaraj kronoj, plenumas iun ajn komision. — Lia fratino 19 jara Piroŝka Varŝanyi ankaŭ deziras korespondi. [1

Ruslandaj samideanoj atentu! Mi deziras interŝanĝi Esp librojn, laŭ deziro ankaŭ germanajn librojn aŭ aŭstr pm. por r u s a j libroj, ankaŭ malnovaj. Skribu al Petro Mohar, Klagenfurterstr. 24, Villach, Aŭstrio. [1

Fraŭlo 19 jara deziras korespondadon k. ĉ. l. per il. pk. kaj l. Adreso: Tomas Bernabé, Strato Cadena 41, 4—3, Barcelona, Hispanujo. [1

S-o Alois Lukawetz, Hostomitz bei Bilin, Ĉeĥoslovakio, deziras korespondi per il. pk. kaj l. kun la tuta mondo.

Atentu Filatelistoj! Kiu sendas al mi 30—100 poŝtmarkojn sialandajn ricevas saman kvanton de Polujo, Danzig, Aŭstrio kaj Rusujo. Sendu al: Wladyslaw Wajsfus, Radom, Pilsudskiego 16, kaj Szymon Rubinstein, Radom, Lubelska 23, Polujo. [1

Atentu Filatelistoj. Vera maloftaĵo estas kaj certege estos la nova unufoja eldono (kupro-preso) de germana poŝtmarko po dekmil markoj kun bildo de Katedralo de Köln (Cologne). Kontraŭ $2^1/_2$ guldenoj aŭ egalvaloro en nacia mono mi sendas 2 ekzemplerojn. Mi ankaŭ dissendas ĉiujn aliajn poŝtmarkojn kontraŭ garantisumeto. Oni pagu nur per monbiletoj. S-o Joseph Paffenholz, Düsseldorf 106, Germanujo. [1

Fraŭlo Waldemar R. Schiel, Burgenländer Bank, A.-G., Braŝov (Rum.), deziras korespondadi per il. pk. kun la tuta mondo. [1

Mi deziras korespondadi per l., pk. il., fotografaĵoj, precipe kun fraŭlinoj. Zjubomir Miĥailov, ul. „Haĝi Dimitre“ 29, Varna, Bulgar. [1

F-ino M. Palms, Beveren-Waes (Belgujo) deziras interŝanĝi pm. kun ĉiuj landoj. [1

F-ino C. Verbraeken, Beveren-Waes (Belgujo) deziras interŝanĝi pm. k. ĉ. landoj krom Germanujo kaj Ĉeĥoslovakio. [1

S-o Adamik Vladimir, instruisto, Slezká Ostrava, Hladnov 1013, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi pm. kaj il. pk. k. ĉ. l. [1

19 jara gimnaziano Dimitr Ivanow „Bedni Kvartalo“ 114, Rusĉuk, Bulgar. deziras interkorespondadi kun gesamideanoj de ĉiuj landoj. [1

S-o Walter Gerstenberger, Oststr. 10, Oelsnitz i. V. (Germ.) 21 jara, deziras interŝanĝi il. pk. kaj personajn fotografaĵojn k. ĉ. l. [1

Vendeblaj kelkaj pm. de Hannover kaj Turn-Taxis. Demandu prezon. Vendas 50 neŝtamp. germ. pm. por 1 sv. fk. Ankaŭ interŝanĝas. S-o Josef Kreutz, Lemgo, Lippe, Markt 4, Germ. [1

Fraŭlo 21 jara deziras korespondadi kaj interŝanĝi kun gesamideanoj el la tuta mondo per il. pk., pm., Esperantaĵoj ktp. Adreso: Stefano Liepa, Marijos g. 39, Panevežys, Litovio. [1

Filatelistoj! Por 2 svis fk. aŭ egala valoro mi sendas 50 div. maloftajn poŝtmarkojn de la liberŝtato Danzig. Interŝanĝas pm. Oskar Köhler, Ölsnitz i. Vogtl., Bergstr. 3. [10

Laŭleĝe deviga teksto germanlingva: Verlag undDruck (Eldonejo kaj Presejo) T. & H. Jung, Horrem bei Köln. Verantwortlicher Schriftleiter (Respondeca Redaktoro): Teo Jung, Horrem b. Köln